



- Nova retejo en facila lingvaĵo
- ILEI fidele, ĝustatempe kaj detale raportas
- Nova asocio malkovrilta en Ruando
- La sekva kongreso en Israelo
- Disertacioj akceptataj pere de UMEA
- Nova Eŭropa Bulteno
- La januara bulteno de la Novjorka Oficejo.

2019-01 sendita el Budapeŝto la 19an de januaro.

Al: Landaj Sekcioj, j Komitatoj kaj aktivuloj de ILEI. Landaj Asocioj de UEA, Fakaj Asocioj, la Komitato, de UEA, TEJO, plia llistoj kaj unuopuloj.

Praktika helpo por novaj novaj adeptoj

“Fine la nova retejo estas preta kaj publike videbla. Jen ĝi: <https://uea.facila.org/>. Aperos artikolo pri ĝi en la februara numero de la revuo *Esperanto* de UEA..” Ĝi nun subiras lastajn kontrolojn kun ebloj por reagoj kaj komentoj.

Plie skribas la iniciatinto Anna Löwenstein: “Mia celo estas aperigi en ĝi 2-3 novajn artikolojn ĉiusemajne. Mi jam havas plurajn pretajn aferojn pri Baldur Ragnarsson (artikolo, poemo kaj filmeto), kiujn mi aperigos tre baldaŭ. Bonvolu laŭeble informi pri ĝi per gazetara komuniko, ankaŭ al viaj propraj naciaj revuoj, al lernantoj, kaj en aliaj rondoj, kie la novaĵo povus esti interesa.”

uea.facila
FACILAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO

Ĉu jama uzanto? Ensalutu

Serĉi

Hejmo Pri ni Facila Verkado Kontakti

Artikoloj Filmetoj Niaj legantoj Loke Kalendaro Venontaj kunvenoj

Hejmo

NIAJ PLEJ LASTAJ FACILAJ ARTIKOLOJ VIDI ĈIU

Nova retejo por novaj esperantistoj
Verkis Anna Löwenstein en *Ĝenerale*, 10an de januaro
3 komentoj 2 347 vidoj

Mortis granda poeto
Afiŝis Anna en *Homoj*, Antaŭ 39 minutoj
0 komentoj 3 vidoj

Trans la rokoj
Afiŝis Anna en *Legajoj*, Antaŭ 1
0 komentoj 5 vidoj

Sciu tion, kion faris ILEI tra la antaŭaj tri monatoj

De jaroj la prezidanto kaj sekretario (kaj la estraro) de nia instruista ligo pretigas kvar raportojn jare, kaj jam alvenis tiu pri la lastaj tri monatoj de 2018. Trovu tion en alkröĉaĵo. Tra 2019 la Ligo festas la 70-jariĝon de la Ligo. Ilia estraro rekontiĝas ĉu fizike ĉu retvoĉe fine de januaro en Svislando

Ruando - Nekonata Asocio funkcias en la kulisoj!

Granda surprizo al ILEI kaj UEA estis la informo pri komplete nekonata landa asocio, kiu en 2018 okazigis kunsidon kaj elektis novan estraron. Temas pri lando en Afriko, najbare al Burundo kaj la DR Kongo – Ruando. Jen la enhavo de ĝia nuna estraro:

SAHINKUYE UWIZEYIMANA Deo: Laulegha Reprezentanto: Tel. (+250) 788689295,
MWAMBALE MATANYA David: Ĝenerala Sekretario : Tel. +(250) 788775365,
KANGABE Albertine: Kasistino: Tel. (+250) 788868230
MURAGEJIMANA Marie: Vic-kasistino
BANDEMA Tamba Jean: Ĝenerala konsilisto: Tel. (+250) 788474533
UWIZEYIMANA Gedeon: Unua Konsilisto: Tel. (+250) 788467316
Robert TEGANYA: Dua Konsilisto: Tel. (+250) 788554570
Daniel Buzombo: komisiita pri publikaj rilatoj
Bonane MUNANGA: Komisiita pri Junularo kulturo: Tel. (+250) 727980210:
Maria, komisiita pri virinaferoj: Tel(+250)783010377

La sekva israela kongreso - aprile

Malaltiĝis la loĝkosto por la 20-a Israela Kongreso kaj MONA-kunveno en aprilo. Bv. aliĝi ĉe <http://esperanto.org/il/ik20-mona.html>. La nova numero de Israela E-isto, kiun vi povos senpage elŝuti ĉe <http://esperanto.org/il/dosieroj/IE166.pdf>.

Abonantoj ricevos la paperan version post ĉ. monato. En ĝi vi trovos i.a. raportojn pri i.a. la 19-a Israela Kongreso en Akko, la UK en Lisbono, kaj la Itala Kongreso. Tiu ĉi estas la unua n-ro de la nova redaktoro, Mikaelo Lineckij, ni deziru al li sukceson kaj kunlaboron viaflanke (sendu artikolojn:). Mi redaktis la bultenon dum 11 jaroj kaj produktis 18 numerojn, kiuj estas videblaj che <http://esperanto.org/il/ie.html>.

Amri Wandel, Prezidanto de ELI

Valora faka agado inter medicinistoj

Eblas verki medicinan aŭ farmacian disertacion en Esperanto kadre de la UMEA, kiu tiucele kunlaboras kun la Jagielona Universitato en Krakovo, Pollando. Se vi estas kvalifikita kaj pripensas fari ĝin, aŭ konas interesitajn gestudentojn el la medicinaj aŭ farmaciaj fakultatoj en viaj landoj, bv. peti ilin kontakti nin. Estus pionira laboro, ĉar laŭ nia scio medicina aŭ farmacia disertacio ĝis nun ne estis verkita kaj akceptita.

Christoph Klawe, Prezidanto de la UMEA

Nova eŭropa bulteno

.Legu: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

- 1.. Novjare
- 2.. 86-a Itala Kongreso de Esperanto
- 3.. Poliglotoj konferencis en Ljubljana
- 4.. Vytenis Andriukaitis subtenas la 55-an BET
- 5.. Sukcesa E-informado en la lernejoj de Nowy Sacz
6. Kurso en la plej granda universitato de 6.Hispanio
- 7.. Zamenhoftago prifestata – Vieno – Zagrebo – Maribor
- 8.. Grabda vortaro aperis en Litovio
- 9.. La venonta hispana kongreso

La redaktoro Z Tišljar – Pajo

UEA daŭre aktivas en Novjorko

La januara informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio che UN estas alkroĉita. La informilo traktas du novaĵerojn: UEA kaj Unesko kaj la mesaĝo de UEA okaze de la 70-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj .

=====
Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.